Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2014-47 sendita sen PDF la 14an de novembro.

PDF postkreita per Nuance Power PDF en la 12a de novembro 2015  SMG

## AMO INTER SCIENCISTOJ:

# Konkrete kaj perrete

Tiel eblas resumi la matene malfermitan sesan seminarion en la serio de Aktivula Maturigo (AMO) de UEA. La pli formala titolo de la kunveno estas 'Ciferecigo de la Esperanto-kulturo' kio bone ennestigas sin en la temon de la gastiga aranĝo KAEST: 'Arĥivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon'. Jen la unua AMO-seminario en kiu la tuta enhavo rilatas al komputiko kaj novaj perretaj ebloj. Feliĉe, la rekorde granda publiko de KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Teknologio) certigas por ni solidan aron da gvidantoj kune kun teknologie kapablaj homoj, kiuj scias aprezi la prezentaĵojn, starigi saĝajn demandojn, kaj interparoli fake pri tiuj temoj.

KAEST

Komputika evoluo revoluciigis la eblojn, ne nur komuniki, sed stoki, protekti kaj disvastigi historiajn, fakajn kaj literaturajn valoraĵojn de nia komunumo, sen signifaj baroj pro kosto kaj bezono de kompleksaj aparataroj. Nur niaj aktivuloj devas koni la eblojn kaj majstri ilin. Tial la seminario. Sub kompreno ke de jaro al jaro alvenas novaj ebloj kaj novaj defioj, kaj ni devas ĉiam postkuri kaj ekmajstri ilin. Tiu demokratiiga tendenco forte favoras nian lingvan komunumeton, kompare kun tiuj kun pli da parolantoj kaj rimedoj.

Post bonvenigaj vortoj kaj la oficiala malfermo de la seminario, la 45-kapa publiko spektis bunte ilustritan lumbildan prezenton pri la celoj de AMO, pri la ses okazintaj seminarioj, la planoj por okazontaj seminarioj ekde nun kaj tra 2015.



Sekvis tema enkonduko de Petro Balaž, kiu emfazis la gravecon sekurigi malnovan materialon dum ĝi ankoraŭ ekzistas kaj alireblas. Li skizis diversajn projektojn por fariĝi kolektejo de verkoj (i.a. bretaro.net), kiu tamen ekzempligas bazan principon de retejoj: "ili estas kiel infanoj, facilaj por produkti, sed multe malpli facilaj por flegi kaj prizorgi: starigo de retejo ne estas la fino de projekto, nur la komenco." Li diris. Kiel ekzemplo de universaligo de aliro al teknologio, li montris malnovan sonkasedon, kaj novan aparaton, kiu kapablas transigi sonbendajn enhavojn al la formato mp3 – tiu aparateto aĉetita lastsemajne kostis nur €13.

Tiam venis la vico de ĉiu gvidanto unu post unu prezenti sin kaj koncize sian temaron, kiu jam prezentiĝis en ĵaŭdo la 13an por frualvenintoj kaj ĉefe disvolviĝos tra la sekvaj du tagoj en pli

praktikaj partoprenigaj sesioj. Ni pli detale skizos iliajn kontribuojn en seminarifina komuniko. Jen ili:

**Eva Fitzelová, Slovakio kun Johannes Mueller, Germanio**
Vojo de podkasta sono: Ne nur oni rigardos podkestajn retejojn, oni vive kreos podkaston dum seminaria sesio.

**Mélanie Maradan, Svislando**
De papero al ekrano: optika signorekono (OSR) kaj tekstar-purigado: Same temos pri praktika sesio en la komputila ĉambro, tiel ke ĉiu seminariano uzos komputilon por trairi la tekst-poluran pocezon.



**Michal Matúšov (KuboF), Slovakio**
Vikipedio, vikifontaro kaj ties kunlaboro pri GBAM (Galerioj, Bibliotekoj, Arĥivoj, Muzeoj), la grupo ELiSO (Esperanto kaj Libera Scio).

**Vladimír Türk, Ĉeĥio**
Sonprilaborado per la programo *Audacity*, fotado de libroj, spertoj pri OSR .

**Václav Zouzalík, Ĉeĥio**
Interretaj arĥivoj kaj Krea Komunumo (i.a. sistemo por mastrumi kopirajtajn demandojn)

Ni kore dankas al KAEST pro la disponigo de tiom fake kapabla gvidantaro, tiom bone ekipitaj salonoj, kaj la eblo okazigi en Slovakio unuafoje AMO-seminarion. Por la AMO-programo temas pri ĝia sesa lando ene de nur ok monatoj depost la lanĉo de la projekto.

Vortoj: 530 Aldonita al vikio 27 apr 2015

---

KAEST estas organizata kunlabore kun Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) kaj Edukado ĉe Interreto (E@I). Jen kolektejo por sciencistoj, teknikistoj, informadikistoj, kaj ĉiu, kiu kredas je la valoro de la faka aplikado de Esperanto.

## Ne nur revu – kunvenu, kunplanu kaj realigu!

**KAEST 2016 okazos de la 17a ĝis la 20a de novembro 2016** (ĵaŭdo-dimanĉo).



La aranĝon gastigos slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno (la loko de SES 2008, SES 2009, KAEST 2010, 2012 kaj 2014.)
La programo konsistas el:

- prelegoj (en du paralelaj blokoj)
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- fakaj diskutoj (pri difinitaj temoj)
- vespereroj (vingustumado, filmo-prezentoj, ks.)
- ekskurso (laŭ interkonsento kaj mendoj)